

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 362</i> <i>dec. / 2021</i></p>
<p><b>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</b></p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <a href="http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm">http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm</a></p>		

## Wally du Temple (Kanado)



### Gravedinta Poeto Nervozas

El mia koro foje poemis  
 Vort-fingretoj, oreletoj paraj,  
 Akuŝintencoj miaj karaj.  
 Ĉu poem-id-ulo naskita antaŭtempis?  
 En hospitalo jen  
 Nud-vundebblas ĝi sub neona zum'  
 Sur post-naskiĝa kov-kusen'  
 sub elektra lum'?'  
 Mi volis tuŝi ĝin  
 Sed ekestas tim'  
 Muro baras min de mia bebo—  
 De vivanta mia haŭt-fald-uleto.  
 Ĉu sufiĉe belas? Ĉu mi kompetentis?  
 Nun manlevas ĝin la kuracist'.  
 La kritikist', la eldonist'  
 Vangon premas mi en la persist'  
 Al naskeja mur' kiu baras min.  
 Ĉu isto volas ke mi plue moldi ĝin?  
 Por plaĉigi iun aljuĝist'  
 Mi faru?  
 Ne, ĝi vivas kaj poemas  
 El mia koro!  
 Nuda, neperfekta sed  
 Mia.



## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### PROVLUDO

Ĉiu ekzistado: unu paŝo  
 en la danco de eterneco.  
 Sed kion do atingas  
 la dancpaŝo senfina?

Memlernanto, do mi serĉas  
 la lumon vivantan en la strio,  
 kiu la korojn kunligas  
 en dolĉa brakumo frata,  
 kaj mi ekmalferas tiel  
 miajn nodojn plej malicajn. .

*Juiz de Fora, 12/11/2021.*

### SERENECO

L' oreloj ne plu eltenas  
 la parolojn bruemajn,  
 kiuj krias en tiu scenejo  
 ĉe niaj lacaj okuloj.

Voĉbruado, bruego,  
 kia tumult', brukriado!  
 Nur konfuzeg' en batalo  
 vidalvide, virtuale...

Mi volas serenon leĝeron  
 de ĉi fluganta papilio  
 en sia flava silento,  
 apud mia fenestro,  
 sencele dancanta en vento.

*Juiz de Juiz de Fora, 14/11/2021.*

## Rita Mkrtchyan (Armenio)



*Amike al unu el bonegaj verkistinoj— Julia Sigmond!*

Senlacaj manoj verkas, skribas,  
Disdonas la belecon kaj bonecon,  
Eterna sent' plenigas koron,  
Valoras pli ol la arĝent' aŭ oro.  
Rigardo laca, la ridet' mistera,  
Multkolorigas tagojn grizajn,  
Animon tuŝas vort' sincera,  
Eĉ, se ne estas Mona Liza.  
Okuloj iĝas diafanaj pro la larmoj  
Kaj en la strofoj— tuta viv' per "skizoj",  
Ŝi "pentras" siajn pensojn sur la paĝoj,  
Eĉ, se ne estas Mona Liza!

## Ángel Arquillos (Hispanio)



**Mia vojaĝo**

De antaŭlonge mi travojaĝas  
ene de mi.  
Bremsi la ĉaron  
mi ne kuraĝas  
eble pro timo,  
ĉar sub la vojo  
estas abismo,  
kaj la ĉevaloj  
plengalopadas,  
Ho mia Dio!  
De antaŭlonge mi nur preĝadas,  
sed la ĉielo, pro la bruego  
eble ne aŭdas  
aŭ ĉar mi vere diras nenion,  
ĉar mi troigas per fantazio  
kaj mi dormadas en mia mio...  
De antaŭlonge mi plore klamas  
kaj kun deliro  
mi nur imagas  
mondajn senlimojn,

ĉar la distanco estas la vivo  
de la forpaso ĝis la naskiĝo  
kaj ĉio falas kiam subite  
sur mia ĉaro vokas min Dio,  
kaj mia vojo montras la finon.

*junio 2021*

## Papos Nascentes (Brazilo)



**Prizorgo de ombroj**

*(post koŝmaro)*

abstrakta senkorpa universala  
praan viron inon  
portas mia animo  
senkorpa akvo-sala portreto  
en mi estas tiel-tiele  
historia patro historia histeria patrin'  
nur akvo-sala memor'

tiu senkorpa histori'  
enkorpiĝas ĉe mi  
per zorgoj malzorgoj koŝmaroj  
fadenbuloj intrigoj fiŝoj retoj  
ŝip-dronoj en nekonscia mar'  
kie ankaŭ jenas songoj soifoj  
kor-inklinaj karesaj malsatoj  
dronitaj amfibioj inter mar' kaj ter'

meze al tio, miaj angoroj  
omfaloj amforoj falusoj timoj  
konkoj karapacoj helikoj  
akra animo l' ĉerkon atendente

l' kadavron atendente...

**PSORA PLORAS**

psora' min trapaŝas, psora' allogas min,  
kiu psora' estas tiu? ĉu terurigas amindum'?'  
verku: el la krajona pinto sentu flui tiu angor'  
tra kanal' facila flukso— akvo scias iri for

akvo scias pri l' kondukanta deklivo de Fonto  
ĝis mar':  
vojojn de mi traŝirintajn jam de longe konas mi

eĉ se per diskonataj kien alveni scias mi!  
 sciaĵon sciatan de ĉiam de hieraŭ de nun  
 se rande mi min detenis randojn brodas  
 (florkolor’)

ve, miaj voj-iluzioj supozigis min voj-iranto  
 akvo jen mi ekde nesto— mia nest’ jen mia  
 Fonto:  
 foriro vojaĝo destino kunestas en flu’ kaj en  
 nun’  
 mi grundo kies deklivon psore mi solvas  
 filtras

tiu juko sen kialo sen kielo  
 ne enas el Fonto en ĝi restas tio ĉu ne vidata?  
 neniam mi lasas esti Fonto eĉ se de akvo-tubo!  
 se per krano eliras mi do min diru klarigu:  
 kie psora’ kaj juko? Mi Estas en Fonto  
 enkrane estante

de krano al buĉoj mi iras soifanta el akraj  
 padoj  
 eĉ se padoj frezas mi estas akvo kaj pac’  
 en bataloj flukso pli kaj pli fluanta:  
 Fonto kaj flukso Mi Estas en nun’ kaj Pac’!

### Joaquim Lagartixa (Portugaliao)



## Tekste


Tio ne estas karno;  
 tio ne estas manĝebla.  
 Karnon oni malamegas spiritaĵe, forte  
 tio ne estas ĝi.  
 Ĝin oni ensorbas, animlekas, spirtuŝas  
 rondaĵlaŭdas.  
 Ĝi ne estas karno,  
 estas roza volumeno nur por la fingroj,  
 kiuj kapablas percepti movojn;  
 karno floras nur en malnovaj rustaj  
 libraĉoj.  
 Ĝi varias, dikas, volumenas.  
 Karno malvivas  
 ja ĝi eligas... parfumece varmas.

Ĝi estas en najtingaloj, en arbaroj,  
 en branĉoj ventopelataj.  
 en la nokto.  
 Forigite de iaj dioj.  
 Ĝi elvidiĝas  
 aplombe, teneruline  
 en fantomecaj horoj  
 ĝi kateniĝas nur per kaĝofingra  
 ĉar ĝi birdinas  
 kaj langvoras  
 en iuj lingvoj kaj langoj.  
 Karno sangas,  
 ĝi vekas ridon.

## Lando

Altaj montoj  
 altegaj, eĉ  
 krutaj  
 malebenaj formoj de la vivo, — agloj  
 irvagule;  
 kruda dolĉo!,  
 Perforte ĉiel staras la perrforto:  
 tamen, homoj persistas!

### Jadranka Miric (Serbio)



## Aŭtune

Vigle dancis vento.  
 Vekiĝas nova sento.  
 Sur trotuaro tapiŝo multkolorita.  
 Ĉiuj koloroj de suno teksita .  
 Brue mateniĝis,  
 laŭfenestro pluvo frapadis  
 ĝis postagmeze tiel tamburadis.  
 Kviete noktiĝis.  
 Se mi scius, kie vi estas?  
 Via adiaŭa kiso, malvarmo  
 sur mia kolo, laŭvia volo,  
 Ve, malbona karmo.



# Nebulo ĉirkaŭ ni

Matena  
tre densa nebul’  
super la arbarparko.  
Videblas neniul’  
nur ia makul’.

Tagmeze  
jen, sunradioj  
penetrantaj nubetojn!  
Ekbrilis post ses horoj  
da sunvarmigoj!

Arbaro  
vigliĝis. Stratoj  
jen, pleniĝis de homoj  
Aŭdiĝis birdo pepoj.  
Sunumis katoj.  
Ŝanĝiĝas  
vetero. Baldaŭ  
venos vintra sezono .  
Tamen varmas hodiaŭ  
ĝis pika morgaŭ!  
Memortago al mortintoj  
Sur la blanka tuko  
flamas kandelo.  
Meze de la tablo kuko  
troviĝas kaj pomoj el la domokelo!  
La tuta domo ŝime odoras  
kiel bonvenon al niaj karaj ci ,  
kiuj sur ĉielo floras!  
Apartan dankon al ili.  
Tradiciaj ritoj  
grave memorigas nin  
por riverenci al ĉielaj spiritoj,  
por neniam forgesi vin!

## PLI RAPIDE TIKTAKAS MIA KORO

En nebula tag’  
pro ia fantoma mag’  
aŭ pro profunda timo intima,  
mi sentas min tre tima.

Aperado de sunradioj

feliĝigas min sincere.  
Vidas mi la mondon bonespere  
rozkoloritan male ol miaj scioj.

Kiam aperas suno  
mi scias ke mi flirtu libere  
tenere svinganta de milda venteto  
kaj de kora pli rapida frapeto.

Suno radiante donas al mi  
novan forton por eviti suferoj.  
Ĝi vigligas la dormantan emocion  
eviti ŝtormajn reagojn kaj gardi  
racion.

## Elena Popova (Bulgario)



*Muzikanta*

Ĉu ludas por li l’steloj  
nokte per violoj,  
aŭ kantas la anĝeloj  
en la ĉielo vole?  
Ĉu marondoj tamburas,  
muzikas laŭvere,  
aŭ per flutoj susuras  
por li la riveroj?  
Kun birdoj kaj vento  
ĉu li ŝvebas libere,  
kie ĉiu-momente  
sonas la ĉielsferoj?  
La talent’ eksentas  
kaj pianas sincere.

## Rigardo al la mondo

(en la bildoj de OLEG TEMELKOV, BULGARIO)

Memoro pri danc’  
kaj eĥo de muziko –  
kara pasintec’.

Oldul’ kun bovoj –  
“oro” en la veturil’.  
Rikoltsezono.

Printempaj sonoj –  
cikoni' en la nesto.  
Blankas la domo.

Solaj boatoj  
ĉe l' bordo. Trista maro.  
Aŭtuno venas.

Rokoj ĉe l' bordo –  
gardistoj de l' vilaĝo.  
La ondoj kantas.

Papavoj en la  
okuloj de l' somero!  
Nedaŭra beleco'.

Kaŝitaj domoj -  
rokoj ilin defendas.  
Noktaj eksonoj.

Rozoj malgajas  
pri amantaj okuloj.  
Falas folioj...

Sola preĝejo –  
sonorilo silentas.  
Neĝo survoje.

Solaj domoj en  
senpopola vilaĝo.  
Nek kanto, nek ĝem'.

Juna amparo  
ĉe la fajro. Am' brulas  
kaj en la koroj.

Printempa buked' –  
heliantoj en vazo.  
La suno tristas...

Memor' el Balĉik  
kun vojet' al la maro.  
Somera invit'.

Abocolibro  
en la infanaj manoj.  
La mond' ekkantas.

## *Amo estas vi kaj mi*

Amo estas vivo kunplektata de vi kaj mi kun  
sincero;

Amo estas la promeso konstanta eĉ dum nia  
sufero.

Amo estas via mano, kiu mian doloron karesas  
tenere kiel levkojo.

Amo estas l' aŭskultado per mia koro pri viaj  
ĉagreno kaj ĝojoj.

En ĉi tiun mondon mi venas malgraŭ ŝtormo  
kaj vortico sur vojo.

Estas via amo-promeso, kiu min ebligas, la  
brilon de sunlumo vidi;

Amo ĉirkaŭbrakas min, kaj mi povas ĝian  
kareson ĝuante avidi.

Eĉ se la vivo alportas al mi senfine suferon kaj  
ĉagrenon,

Mi ankoraŭ trovas en la plimultaj okazoj la  
benon.

## *La kampfajro valso*

La luno super lago brilas,  
Zefiro milda dolĉe trilas.  
Karuloj lago-borde rendevuas,  
La nokton de Ĉagan-Lago oni ĝuas.  
Amikoj venu, amikoj karaj!  
La nokto nin tuj rave impresos.  
Ho venu kompaniuloj paraj!  
La aŭroron ruĝan tuj ni karesos.  
Kampfajro brulas kun ardo nia,  
Muziko ŝvebas el fonto pasia.  
Ni dancas kun la verda imago,  
Tre sorĉas nokto de Ĉagan-Lago!

## *Pasioplana rozo*

Al vi mi tiun ĉi rozon donas,  
Kiu mian afablecon proponas.

La rozo estas pasioplana,  
 Nia amo estas ĉiam bontena.  
 La rozo nenion parolas,  
 Sed tamen vin ĉarmi volas.  
 Mi estas eĉ pli silenta,  
 Kaŝiĝas kore sopiro senta.  
 Espereble vi komprenas mian koron,  
 Kaj akceptos mian fervoron.  
 Ni estu ĉiam kunaj,  
 Eterne kunaj!

*Esperantigis*



**Yi Qiao (Ĉino en Germanio)**

**Mimoza Ahmeti**



**MIA TUTO**

Lazuraj veplorojn por vi ellasas la haroj  
 Kaj la buŝo nur fendetita spegulo estas  
 Pro la doloroj el la korpo eligitaj per forŝiro,  
 El tio kiun mi okupintis por neniam ellasi vin.  
 Ho, denseco je verda herbo de la via brusto,  
 Ho, sovaĝaj arboj aromellasantaj de viaj  
 kruroj,  
 Ho brakoj kiuj nur brakojn kaj nur brakojn  
 ellasas,  
 Ho, vi, mola kaj samtempe forta kolo.  
 Ho vi, tuto  
 La tuto de mia nokto, de mia tago,  
 Vi, ĉio.

Ho, malluma globo, ho blinda globo, ho  
 detruiga globo  
 De via mordita orgojlo.  
 Ĉiuj vi, ĉio ĉe vi...  
 Mem vi:  
 Staru, rigardu,  
 Ne mortu en miaj manoj.  
 Tero unufoje trovita  
 Neniam plu estas forgesita.

**Lasu min**

Lasu min enpace!  
 Kiel vi tiel traktas min kvazaŭ infanon, kvazaŭ  
 bebon  
 Kiel vi brakojn miajn subpremas!  
 Kiel vi ĉirkaŭis min per muroj, litoj, libroj,  
 Ĉiuj do malvarmaj objektoj!

Lasu min! Ĉu vi komprenas ke pro via  
 zorgado,  
 Mi apenaŭ freneziĝas?  
 Ĉu vi komprenas ke ĉi tiu via ordigilo, via  
 moralo,  
 Min ĝis la malsaniĝo malordigas?

Lasu min! Kiel vi enfermis min kvazaŭ  
 bestion en la reto,  
 Kial vi fieras envane pro mi, trafu vin  
 apopleksio!

Lasu min! Mi ne al vi apartenas.  
 Lasu min atingi tion kion mi volas,  
 Ĉar tio kion mi volas estas ja mia vivo.

*Elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**  
 (Albanio)

**El Ĉina Antikva Poezio**

**Li Qingzhao (1084-1151)**

—laŭ melodio *Papilio super floroj*  
 Larmfluo malsekigis vangojn  
 pudritajn kaj vestaĵojn plene.  
 La kanto de disiĝo sonas  
 fojfoje ĝene kaj ĉagrene.  
 Trans montoj iros vi la vojon  
 sinuan malfacile kaj fortpene.  
 Mi sidas sola en loĝejo apudvoja,  
 aŭskulte al tiktakoj de pluveto splene.

Ĉe l' disiĝ-horo jam ondadis,  
ve, miaj pensoj en pelmelo.  
Mi eĉ ne scias, kiom da alkoholaĵo  
mi trinkis kaj en kia maniero.  
Do, sendu al mi ofte  
leterojn per sovaĝansero  
ja por konsoli mian koron  
el via loko, kun sincero.

—**laŭ melodio *Papilio super floroj***

Dum longlonga nokto  
mankas al mi ĝoj' kaj ridmieno.  
Mi nur sonĝas pri l' revena voj' al  
Chang'an,  
kie mi rekonas ĉion sen ajna peno.  
La printemp' ĉi-jara belas, floroj  
flagras sub lunombra baldakeno.

Mi preparis kelkajn pladojn  
nur por familia la festeno.  
Bela vino kaj maldolĉaj la prundrupoj  
vere plaĉas al ni kaj bongustas en  
konveno.  
En ebrio ne en vazon ŝovu florojn,  
por ne vekojn moki en la sceno.  
Kiel homoj oldos, la printempo  
kompatinde malaperos tuj en sveno.

—**laŭ melodio *Suda kanto***

Moviĝas steloj sur ĉielo,  
Kurtenoj pendas en la ĉelo.  
  
Malvarm' naskiĝas sur kapkuseno,  
larmeroj gutas kiel silk-fadeno.  
  
Demetas mi la vestojn por dorm-preto,  
do, kiam nokt' finiĝos disde tede?  
  
La ornamaĵoj sur la vest' malnovas,  
la brilkolorojn sur ĝi mi ja ne plu trovas.  
  
Senŝanĝe nokto restas nokt' tiama,  
vesto estas la malnove sama.

Sed mia sento jam pli tristigas  
ol la antaŭa, ve! kaj plu persistas.

—**laŭ melodio *Ĉarma kantistino***

En dezerteca korto  
pluvetas, blovas vento.  
Dompordojn ĉiujn nepras  
strikt-fermi jen en ĉi-momento.  
Koketaj floroj, favorataj salikarboj  
ne povas bravi kontraŭ la veter-turmento.  
Kia diabla la veter' ĉe proksimiĝo  
de Fest' de frid-nutraĵoj\* . En lamento  
mi skribas versojn per malfacila rimo.  
Min kaptas la enua sentimento  
post kiam mi sobriĝas el ebr' matena.  
Sovaĝanseroj preterflugas sur la  
firmamento,  
sed ne volantas komuniki  
ĉagrenojn miajn, ve, per leter-sendo.

Printempa frid' invadas etaĝdomon  
dum kelkaj tagoj en rigoro.  
Malalte pendas la fenestrkurtenoj  
en flankoj kvar, kaj mi en solo  
al jada balustrado min apogas  
enpense kun langvoro.  
Volvite en la litkovril' mi sentas  
min pli kaj pli malvarma en ĉi horo,  
kaj incensuj' jam frue estingiĝis.  
Jen vekinte mi el dorm-torporo  
leviĝis kaj paŝadas tien reen.  
Matenaj rosoj glimas en lum-gloro  
kaj platanĝermodoj freŝe verdas.  
Naskiĝas em' ekskuri, en la koro,  
printempe sur tapiŝo herba.  
Sunlum' radiojn verŝas jen en palkoloro,  
numeroj disen flosas glate,  
verŝajne la serena tago venos kun favoro.

\* *Festo de frid-nutraĵoj estas la tago, en kiu oni  
manĝas malvarmajn nutraĵojn.*

*elĉinigi*



**Vejdo (Ĉinio)**

## Xie Lingyun (385 - 433)

### *Ascendo al la sola insulo en la rivero*

Jam tedas min l' sudlanda travojaĝo,  
 kaj nun min ravas norda la pejzaĝo.  
 La vojo al la plezur-loko nova  
 sinuas, kaj ne multas temp' almova.  
 Al ĝi mi do l' torenton transveturas,  
 la ĉarmo river-meze sin konturas.  
 Kun nuboj harmonias sun' en brilo,  
 kaj kunfandiĝas akvo kaj ĉielo.  
 L' insul' tro belas por homa admiro,  
 kaj kiu l' belon notus pro ĉi miro.  
 Imagu kiel sorĉas fe-spirito—  
 ĉi mondo forlasitus de ermito.  
 Mi nun komprenas, ke en tiu sfero  
 ekzistas vivlongeca maniero.

## Zhao Yi (1727 - 1814)

### *Rimarko pri poezio*

Sennombraj adeptoj surbuŝe heredas poemojn  
 de Li Bai kaj Du Fu, senteble nefreŝajn  
 ĝisnune.

En ĉiu epoko aperas novaj geniuloj,  
 kiuj poezion kondukas jarcentojn komune.

## Li Gou (1009 - 1059)

### *Sopiro al la hejmloko*

Al la rando de la tero, kie l' suno falas,  
 forte mi rigardas, kaj ĉe mi hejmve' amaras.  
 Min ĉagrenas, ke krepuskaj nuboj nun vualas  
 verdajn montojn kiuj vojon al la hejmo baras.

## Zhang Shunmin (?-?)\*

### *Loĝado en vilaĝo*

Sur kampo de deklivo fluas akvo,  
 bambuoj heĝon tra-invas.  
 Hibiskaj floroj defalintas preskaŭ,

ulmofolioj tre sporadas.

La suno nun subiras. Sur bubalo  
 ne knabopaŝistet' paradas,  
 sed nigra korvo, kiu kun portanto  
 akorde hejmen promenadas.

\**La poeto vivis dum la periodo de la dinastio Song (960-1279).*

## Wang Zao (1079 - 1154)

### *En printempaj tagoj*

Daŭras preskaŭ dek sensunaj tagoj de  
 printempo,  
 supre ĉie ŝvebas nuboj plenaj je vapor'.  
 Verda akvo kampa pli ŝanĝbrilas ol spegulo,  
 ĉe l' pramejo homa ardeoj ne flugas for.  
 Apud heĝo rave burĝonantaj persikofloroj  
 ridas, kiuj plaĉivole flirtas en fervor'.  
 Pluvnebulo malsekigas vestojn de pasantoj,  
 vekas siestantojn kokerik' en sonĝa hor'.  
*elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**



## Zhuangzi

### ĈAPITRO DUDEK-KVARA

## Xu Wugui

### §26-04

Iuj konfuceanoj, studentoj de *Libro de Poezio* kaj *Libro de Ritoj*, sin okupas je rompado kaj priŝtelado de antikvaj tomboj. Ilia majstro diris al tiuj, kiuj estis en la rompita tombo: “Jam tagiĝas. Kiel iras la afero?”

“Ni ankoraŭ ne demetis la vestojn de lia kadavro, sed ni trovis perlon en lia buŝo,” respondis la junaj konfuceanoj.

La majstro diris:



“Kiel estas dirite en *Libro de Poezio*,  
 ‘Jen verdaj, verdaj estas la grenplantoj,  
 Kreskantaj vigle sur la montdeklivo.  
 Vivante li neniam almozdonis,  
 Kial post mort’ kun perlo en la buŝo?’

Vi do kaptu liajn harojn sur la tempioj, tiru lian barbon malsupren, frapu lian mentonon per martelo kaj malfermu liajn makzelojn. Sed nepre tiel delikate, ke vi ne difektu la perlon en lia buŝo.”

### §26-05

Iu disĉiplo de Laolaizi eliris por kolekti sekiĝintajn branĉojn por bruligado kaj hazarde renkontis Konfuceon. Reveninte en la domon li diris al sia majstro:

“Tie estis viro kun longa trunko kaj mallongaj kruroj. Lia dorso estas iom malrekta, liaj oreloj malantaŭeniĝas kaj liaj brilaj okuloj direktiĝas foren kvazaŭ observante la tutan mondon. Mi ne scias, kiu li estas.”

“Li estas Konfuceo,” diris Laolaizi. “Venigu lin ĉi tien.”

Kiam Konfuceo envenis, Laolaizi diris al li:

“Konfuceo, se vi senigas vin je via aroganteco kaj via saĝa aspekto, vi fariĝos noblulo.”

Konfuceo riverencis kaj retroiris je du paŝoj. Poste, maltrankvila li ŝanĝis la mienon kaj demandis Laolaizi:

“Ĉu mi povos fari ankoraŭ progresojn en miaj virto kaj lernado?”

“Ne,” respondis Laolaizi, “ĉar vi, ne povante toleri la malbonojn de tiu ĉi unu generacio, neglektas la malfeliĉojn de dek mil generacioj estontaj. Ĉu tio venas de via mizera obstineco aŭ de via nesufiĉa inteligenteco? Peni plaĉi al la homoj per donado de favoroj al ili kaj fieri pri tia ago, estas honto dum la tuta vivo. Jen tio, kion faras la homoj mezkvalitaj: altiri la homojn per sia famo kaj kolekti ilin ĉirkaŭ si per profitoj. Ne estas preferinde laŭdi la bonan reĝon Yao kaj kondamni la tiranon Jie, ol forgesi ilin kaj fari neniamajn komentojn. Agi

kontraŭ via denaska naturo estas vundi vin mem, kaj perturbi vian trankvilan menson kondukas vin al devojiĝo. La saĝulo estas senhasta en la plenumado de io ajn, kaj tial li ĉiam atingas sukceson. Kial do vi ĉiam fanfaronas pri viaj atingoj?”

### §26-06

Iun nokton, la duko Yuan de la regno Song havis sonĝon pri iu viro kun distaŭzitaj haroj, kiu enrigardis tra flanka pordo kaj diris:

“Mi venas de la abismo nomata Zailu. Kiam mi estis survoje kiel sendito de la Klara Akvo al la Rivera Dio, mi estis kaptita de fiŝisto Yu Ju.”

Kiam la duko vekigis, li ordonis, ke oni interpretu la sonĝon. Oni respondis al li:

“Tio estas sankta testudo.”

“Ĉu inter la fiŝistoj troviĝas iu, kiu estas nomata Yu Ju?” demandis la duko.

“Jes,” oni respondis.

“Venigu lin al la kortego,” diris la duko.

Kiam Yu Ju aperis en la kortego la sekvan tagon, la duko Yuan diris:

“Kion vi kaptis lastatempe?”

“Mi trovis blankan testudon en mia reto,” respondis la fiŝisto. “Ĝia karapaco mezuriĝas circonference je kvin ĉi-oj.”

“Prezentu vian testudon,” ordonis la duko.

Kiam la testudo estis alportita al la kortego, la duko ne povis decidi, ĉu ĝi estu mortigita aŭ bredata. Finfine li decidis konsulti la orakolon. La respondo estis: Mortigu la testudon por fari aŭguradon. La testudo do estis mortigita kun la ŝelo utiligata por la aŭgurado, kaj el la sepdek du aŭguroj, kiujn oni faris sur la ŝelo, neniu pruviĝis malvera.

Konfuceo diris pri tio:

“La sankta testudo povis aperi al la duko Yuan en ties sonĝo, sed ĝi ne povis eskapi el la fiŝreto de Yu Ju. Ĝi estis sufiĉe saĝa por fari sepdek du respondojn en la aŭgurado sen pruviĝi malvera, sed ĝi ne povis eskapi la seniĝon je sia internaĵo for de la ŝelo. Tial, el tio ni povas vidi, ke la homa saĝeco havas sian

elĉerpiĝon kaj ke la spirita povo havas siajn limojn. La perfekta saĝeco povas esti superita de la ruzoj de dek mil personoj. La fiŝo timas la pelikanon, sed ne scii eviti la fiŝreton. Forĵetu vian etan inteligentecon, kaj vi estos lumigita per la granda inteligenteco; forĵetu vian ŝajnigitan bonfaremon, kaj vi havos naturan bonfaremon. La bebo ellernas paroli sen majstra instruisto, ĉar ĝi vivas inter la homoj, kiuj scias paroli.”

*Elĉinigis*



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

# Ĉineske

**Jadranka Miric (Serbio)**

LUMO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Novembra  
nebula maten’.  
Aŭdiĝis miaŭa blek’  
el proksimo de ĝarden’!  
Ĉu gastaalven’?

Apude  
la tilio jam  
nudiĝis. Nek unu bird’  
alflugis sur ĝin. Sen am’  
mortos vivoflam!.

Kun suno  
ĉio vigliĝis.  
Amaso da homoj jen,  
tre brue amuziĝis,  
pare gajiĝis!

Pleniĝis

kafekortejoj.  
Tre bonodoras aer’  
pro diversspecaj teoj.  
Naskiĝis revoj!



*Tempo pasas*

Flaviĝis  
Saliko. Longaj  
branĉoj pendas malgaje.  
Mortaĉas putre. Flavaj  
susuras’sekaj.

Sur ĉiel’  
viciĝis nuboj,  
malantaŭ spuroj de Sun’.  
Trankvila tago. Krioj  
de kolombinoj!

Vespero,  
jen, pli esperata  
ol morgaŭa tag’. Tamen  
sen suna tre severa.  
Vivo prospera?

Ankoraŭ  
montgrimpantoj  
surgrimpis venkinte jam  
la montopinton! Homoj  
fortas en gupoj.

Sporto aŭ  
ekskurso? Ambaŭ,  
respondis la virino.  
Ŝi konkeros la monton laŭ  
forta kredo aŭ?

\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksoforma

poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo  
xa,xa,a (x=senrima).

## Li Weilun (Ĉinio)



Ĉina teo

—laŭ la ĉinesko Dekses-silabo\*

He,  
fama estas ĉina te’.  
Trinkeblas  
tra la tutare’.



\* Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj  
de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

## Rita Mkrtchyan (Armenio)

Ĉiutage ŝi pripensis, ke necese ŝanĝi  
vivmanieron, forlasi virtualan mondon, i-reton,  
almenaŭ uzi ĝin pli mallongan tempon, kaj  
reveni al libra mondo.

Jes, la libroj estas atingeblaj en la reto, kie  
ĉiu povas trovi kaj tralegi ĉion, kion deziras.  
En pasinta tempo neniu imagis similan  
eblecon.

Sed hodiaŭ matene, ŝian rigardon altiris  
libroj el libroŝranko— karaj, amataj, malnovaj  
kaj novaj.

La libroj aspektis solaj kaj forlasitaj, ili  
ŝajnas flustris:

— Kial vi perfidis nin?

Ŝi prenis unu el amataj libroj kaj  
malfermis ĝin. Inter paĝoj ŝi ekvidis sekitan  
floreton. Ĉi-tiu bona (aŭ malbona) kutimo  
restis de infaneco, kiam en multajn librojn ŝi  
enmetadis folietojn, floretojn, verŝajne por pli  
longigi la vivon de kreskaĵoj, aŭ por iumaniere  
danki la libron.

Nun tiu-ĉi seka floreto montris, kiel  
ŝanĝiĝis la vivo.


Progreso, ŝajnas, sekigis niajn animojn,  
kvankam ĉiuj homoj iĝis pli evoluintaj,  
eruditaj, spertaj, “ĉiopovaj”.

Ĉi-tio ne estas malbone, sed kio pli proksimas  
al ili — tiu, preskaŭ forgesita aŭ nuna mondo?

La demando ne estas Ŝekspira, sed same  
restis sen respondo.

Ŝi fermis la libron, kie restis “silueto” de viola  
floreto, “silueto” de ĉiuj pripensoj, revoj kaj  
esperoj.

## Ivanichka Magharova (Bulgario)



Patrino

Javor estis revenonta de la laboro, kaj ŝi  
rapidis reordigi la fotojn en la albumo. Ŝi ŝatis  
rigardi ilin, ili turnis ŝin al la pasinteco.  
Memoroj, kiuj restas en via koro kaj neniu  
povas forpeli ilin de tie. Ekzistis belaj, ekzistis  
ankaŭ malĝojaj—karaj memoroj.

Jen la tuta familio: la filo kaj la filino, ŝi  
kaj ŝia edzo, “Dio indulgu lin,” diris laŭte kaj  
krucsignis sin. Poste ŝi rigardis la alian kun  
siaj genepoj longan tempon. Ŝi tre amis ĝin.  
Ĝi estis ŝia amata. Eble estis ŝia plej proksima  
al la koro. Lazaro, ŝia edzo, Javor kaj Kalina,  
kaj ŝiaj genepoj, la infanoj de Kalina. Javor ne  
havis infanojn. Ii havis familion, sed ili ne  
estis konvenaj unu al alia kaj disiĝis post  
kelkaj jaroj post la geedziĝo. Kaj Javor poste  
ne plu volis havi virinon ĉe si mem. Sed ŝia  
plej kara estis nigre-blanka foto, kiu longe  
estis inter siaj personaj havaĵoj. Ĝi ne estis en  
la albumo. Ŝi enmetis ĝin tien, kiam ŝia edzo  
forlasis ĉi tiun mondon. Ne, ke li koleros  
kontraŭ ŝi, ne! Li estis tre bona kaj estis  
komprenonta ŝin. Sed ŝi ne volis ĉagreni lin, ŝi  
ne volis montri al li, ke ŝi faris la plej grandan  
oferon en sia vivo. Sed ĉu ŝi oferis sian  
estontecon, sian feliĉan vivon?

Estis antaŭ sesdek jaroj, kaj ŝi estis juna,  
bela kaj enamiĝinta, jes, en la viron de tiu ĉi  
foto. Kun ŝia amikino kaj studentino el

